

Richard von Schaukal,  
Sub vintraĵ steloj

*tradukita de Manfred Retzlaff*

La nokt' silentas sub la rond' ĉiela,  
Multoble brilas stela lum-radi'.  
El iu foro venas spir' alŝvela,  
Resinkas en tegitan grundon ĝi.

Rigardas mi l' trembrilon en trankvilo,<sup>2</sup>  
La nigra volb' etendas larĝe sin!  
Ne sentas mi min en la fremda brilo,  
La senfinco superfortas min.

*Traduko de la Germana poemo "Unter Wintersternen" de RICHARD VON SCHAUKAL (\*1874-05-27 – †1942-10-10) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-637-1283 (2013-07-27 19:19:27)*

*Tiu ĉi poemo aperis en 1989-01-29 en la germana eklezia gazeto "Bistumszeitung Münster", sur pago 2.*

---

<sup>2</sup>aŭ:

Rigardas mi la stelojn en trankvilo,